

# QUANCO

2-4/03

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



Oficiala Organo de  
Kuba Esperanto-Asocio  
(2-4/2003)  
Aperas 4-foje jare

Eldonas:  
Kuba Esperanto-Asocio  
Poŝfako 5120,  
10500 Havano, Kubo  
Telefonoj: ++53(7)53 9102  
kaj 40 4484  
Fakso: 649 8729  
Retadreso:  
kubesp@enet.cu

Ĉefredaktoro:  
ALBERTO GARCÍA FUMERO

Revizias kaj kontrolas:  
MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Enpaĝigo:  
ALBERTO FÓEZ-CALIENES BARRIOS

Prezo: (enlande) CUP 1.00  
(eksterlande), EUR 2.00  
aŭ 2 irk., pagendaj al la  
UEA-konto: keax-u.  
Ĉiuj rajtoj rezervitaj  
Reproduktado permesata  
(bv. indiki la fonton kaj  
sendi du ekzemplerojn al  
la Redakcio).  
Interŝanĝo dezirata.

La kovrilo:

Muziko, balo, torto:  
plian datrevenon de Kuba  
Esperanto-Asocio oni  
festis gaje en la sidejo de  
Centra Havano kun  
rekorda partopreno.


## estimataj

*Problemoj kaj financaj kaj organizaj prokrastigis la aperon de Avanco kaj devigis nin kunigi la numerojn 2 ĝis 4 de la jaro 2003, por ke ĝi ne ŝanĝu la nomon al "Retroiro".*

*Ŝercojn for, ni iom post iom rekaptoŝ la paŝon kaj ĝisdatiĝos. Sed daŭra bezonaĵo restas kaj restos via kunlaboro. Memoru ĉiam, ke tiu ĉi estas nia komuna organo, ne organo de nur la Nacia Estraro.*

*Dume, sciu pri nia 20-a Komitatkunsido kaj la pasinteco de la Tutamerikaj Kongresoj de Esperanto; ĝuu ĝisfundan esploron de Juan Lázaro Besada pri nia Esperanta kanzonistiko kaj informiĝu pri novaĵoj en nia biblioteko.*

*Plezuran legadon!*

  
Via ĉefredaktoro,  
Mag. ALBERTO GARCÍA FUMERO

## enhavo

### *20a Komitatkunsido*

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

3

### *La Tutamerikaj Kongresoj de Esperanto*

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

5

### *Kia Esperanto-movado por Ameriko?*

ALBERTO GARCÍA FUMERO

8

### *12-a Internacia Librofoiro*

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

9

### *La Esperanta kanzonistiko en Kubo*

JUAN LÁZARO BESADA TOLEDO

11

### *el nia biblioteko: Miavoĵo*

TINEO

14

### *angulo de la duboj: Inaj vortoj*

PIVULO

15

## 20-a Komitatkunsido Nova spirito en Sancti Spiritus

En la ĉarma kaj ankoraŭ koloniaspekta urbo Sancti Spiritus, kunsidis la komitatanoj de la 24-a ĝis la 25-a de januaro por okazigi la 20-an Komitatkunsidon de Kuba Esperanto-Asocio.

Post sufiĉe laboriga jaro, la plej gravaj analizendaj aferoj estis la bonfarto de la asocio entute, kaj la laborpreparoj por la sukcesa okazigo de la 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto, okazonta en Havano en 2004.

Novaĵo estis, ke ĉi-foje ĉiuj estraranoj laŭtlegis sian raporton anstataŭ ol kunigi siajn informon en resumo. Tiel ni celis pli

da travidebleco kaj pli profundajn debatojn kaj analizojn, kio montriĝis trafo. Ne nur eblis demandado pri apartaj aferoj, sed pli facila korektigo de misetoj kaj neprecizigoj. La analizo estis ĝisfunda kaj rekta, kaj surprize la tempo sufiĉis por ĉiu ero.

Utiligo de Esperanto kaj Faka Agado restas gravaj kontrolendaj aferoj, ĉar la laboro tiukampe ankoraŭ ne sufiĉas. La agado de Kuba Esperanta Medicina Agado lamas, kaj oni bezonas multe pli da atento al ĝi; ankaŭ al fakuloj, por ke ili restu aktivaj asocioj. Varbado de novaj esperantistoj kaj flegado de la asociano estis alia



afero prianalizata, ĉar ĝi ligiĝas al la informada laboro. Bona informado ne nur primovada, sed ankaŭ por la ĝenerala publiko estas esenca por la reteno de la asocio, kaj ni cetere bezonas pli da fakuloj en nia movado.

Multajn laŭdojn ricevis la retpaĝaro kreita de Norberto Guevara (Sancti Spiritus) kaj pri la filio kaj KEA.

Kontrolo de la membronombro ankaŭ devos ricevi pli fajnman kribradon por ke ĝi ne turniĝu en kapdoloron. La informoj ankoraŭ ne sufiĉe bone fluas de filioj al la nacia estraro kaj al la aliaj filioj. Estas bedaŭrinde, ke kelkfoje oni ne informas ĝustatempe kaj precize pri laboro farita, kaj do nur dum Komitatkunsido eblas scii pri iniciatoj, ideoj aŭ problemoj sekvendaj aŭ solvendaj. Tiel povas eĉ ŝajni, ke filio ne laboris dum la jaro. Granma, Sancti Spiritus kaj Santiago estis la plej akurataj informintoj.

*Kvara Kultura Festivalo en  
Santiago de Cuba,  
Partopreno en la Havano  
Internacia Librofaira,  
Venontsomera Infanfestivalo  
en Quantánamo.  
Seminarioj por Aktivula  
Trejnado en Santiago,  
Granma, Quantánamo,  
Camagüey... kaj pli!*

Salono pri Esperanto en la provinca Biblioteko de Guantánamo estis unu el la perloj en la krono de la laboro lastjara, kaj la atingo ĝojigis ĉiujn. KEA ankaŭ povas fieri pri daŭraj rilatoj kun ICAP, Asocio Kuba je Unuigintaj Nacioj kaj la sansistemo, sed ni strebu ampleksigi la cirklon je amikeco kaj kunlaboro.

Je granda intereso estis la informoj pri kio estas jam farita kaj planita por la venonta TAKE, kaj pri kio restas ankoraŭ farendaĵo. Fakte, temas pri la plej grava evento en nia lando ekde la sukcesa Universala Kongreso en 1990. Ni bezonas la helpon, laboron kaj komprenon de ĉiuj asocioj ne nur rilate al la taskoj dumkongresaj. Sed ankaŭ rilate al la loĝigo de kubaj partoprenontoj, ĉar la kondiĉoj nialandaj ne estas la tiamaĵ kaj aliflanke la amerika esperantistaro multe esperas je ni.

Ĉiam ĝojiga estas la momento diskonigi la rezultojn de la konkurado inter la filioj, kaj kompreneble ankaŭ en ĉi tiu Komitatkunsido. Granma gajnis ĝin, kun rekonaj por Sancti Spiritus kaj Santiago de Cuba, pro la akurata sendado de informoj; Guantánamo, pro la estrara stabileco kaj la okazigo de du tutlandaj renkontiĝoj dum la jaro; Camagüey, pro la fakto ke tiu filio estas la ununura kiu garantiis pli ol cent membroj, kaj Urbo Havano, pro la granda nombro da aranĝoj faritaj.

Post vigla debato, la laborplano enhavas 5 seminariojn por aktivula trejnado: februare (Santiago), marte (Granma), majo (Urbo Havano), julio (Guantánamo) kaj novembro (Camagüey), Infanfestivalon en Guantánamo dum 2004 (somere), jam nun preparenta, ĉar ĝi devos esti sufiĉe frue anoncita, krom la regulaj aranĝoj kun la asocioj. Ĉar oni devos pretigi kondiĉojn por la venontjara TAKE, ni bezonas ŝpari energiojn. Do, laboro estas, kaj spirito ankaŭ, ek!

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

## La Tutamerikaj Kongresoj de Esperanto

### Malnovaj revoj renaskiĝas

Antaŭlonge en Latinameriko naskiĝis la ideo starigi rilatojn kun esperantistoj de la regiono kaj pri la ebleco iam okazigi amerikajn kongresojn.

Pruvoj pri tio troveblas en landaj gazetoj kaj bultenoj. En Kubo, la plej malnova kaj serioza projekto aperis en marto 1916, en la unua numero de *Latinamerika esperantisto*, (LE) oficiala organo de Societo Kuba por la Propagando de Esperanto.


Celante disvastigi E-on en latinamerikaj landoj, jam ekde tiu momento, LE proponis fondiĝon de Latinamerika Esperantista Unuiĝo (LEU), en kies Komitato estus reprezentantoj de ĉiuj tutlandaj E-asocioj. Tiu gazeto ankaŭ konsideris la eblecojn havigi Centran Oficejon al LEU kaj okazigi kongresojn de tiu Unuiĝo.

Bedaŭrinde, la ideo ne sukcesis, ĉefe pro tio ke ĝi montriĝis tro revolucia kaj fariĝis vere nerealegebla afero en tiu epoko. Poste, la agado por E-o marŝis en aliajn direktojn, avancis aŭ malavancis laŭ la lokaj kondiĉoj; kaj la celo kreskigi kaj plifortigi la movadon en la regiono restis en la aero. Kun escepto de izolitaj klopodoj (kiujn siatempe faris mag. Tibor Sekelj kaj s-ino Haudebine), nenio estis plane farita dum jardekoj sur tiu kampo.

Jam fine de la 70aj jaroj, la situacio estis tute alia, eĉ etendiĝis opinioj pri la ebleco okazigi universalan kongreson en Sudameriko. En rilato kun tio, sufiĉas legi



Kovrilo de *Latinamerika Esperantisto*, n-ro 1 (1916).



*Kovrilo de Esperanto, n-ro 866 (1978): Faktoj pri Sud-Ameriko en la jaro 1978: Ekmoviĝo de giganta galapaga testudo ĉe la nula latitudo en Ekvadoro (supre, maldestre); akcepto de esperantista delegacio ĉe s-ro Elmo Serejo Farias – maldekstre –, guberniestro de la Federacia Distrikto de Brazilo. (Supre, dekstre); fama kolombia ensemblo Kvara generacio, kiun gvidis esperantisto (centre); kaj kunveno de aktivuloj de Brazila Esperantista Junulara Organizo (sube).*

paragrafon de “Revalorigo de kolektivo kiel gvidorgano”, informo de Simo Milojević (*Esperanto*, n-ro 857, majo 1977, paĝoj 81-82) pri la aprila estrarkunsido:

Apud la jam faritaj decidoj pri la kongresurboj en 1978 kaj 1979, la Estraro principe diskutis plurajn aliajn formalajn kaj neformalajn invitojn, sed ne faris pliajn decidojn ĉi-rilate. Unu afero tamen estu ĉi tie menciita: Temas pri la sufiĉe disvastiĝinta (ne pere de nia revuo) opinio, ke la UK en 1980 okazos en Brazilo. La Estraro dekomence kun simpatio rilatis al tiu ideo kaj ankaŭ dum

la nuna kunsido konfirmis, ke principe UEA eĉ entuziasmas pri la ideo kongresi en la sud-amerika kontinento. Tamen, nun estas jam ne eble aranĝi tie kongreson en 1980, sed la vojo restas malferma por inviti UK al Sud-Ameriko en iu el la jaroj post 1980.

Do, ne nur aperis ideo pri tio, sed ankaŭ ekestiĝis kondiĉoj, kiuj iamaniere kreis etoson favoran al okazigo de UK en la regiono. Al tio aldonendas ke, inter la 14a kaj 31a de decembro 1977, s-ino Ursula Grattapaglia, tiama estrarano de UEA pri landa kaj regiona agado, faris grandegan vojaĝon kaj vizitis ĉiujn sudamerikajn landojn en kiuj ekzistis organizitaj klopodoj disvastigi la Internacian Lingvon.

En “Tra la kontinento de la 66a UK” – raporto de Simo Milojević aperinta en *Esperanto*, n-ro 866, februaro 1978, paĝoj 24 kaj 25 –, pri la januara estrarkunsido, oni legas ke

...s-ino Grattapaglia verŝajne faris la plej multekostan vojaĝon en la pli nova historio de UEA. Tamen, la informoj, renkontiĝoj, impresoj, instigoj, diskutoj, intervjuoj kaj artikoloj, kiujn ŝi kolektis, ĉeestis, spertis, faris aŭ provokis, multfoje superas la valoron de la farita investo.

Post prezenti kelkajn interesajn notojn, laŭlande, pri tiu eksterordinare grava vojaĝo, el kio fontas aliĝpeton al UEA fare de landaj asocioj de Peruo kaj Venezuelo, la raporto konkludas tiel:

Tri malgrandaj ŝtatoj en la nordo, du Gvajanoj kaj Surinamo, kaj Paragvajo, centre, estas la solaj landoj de Sud-Ameriko, kiuj restis ekster la vojaĝplano de s-ino Grattapaglia, sed – laŭ nia scio – Esperanto ankoraŭ ne penetris tien. Dum sia vizito al Eŭropo, s-ino Grattapaglia transdonis al UEA ankaŭ la aliĝpeton de Meksika Esperanto-Fe-

deracio. Eĉ se la sola rezulto de ĉi tiu plurmilojn da kilometroj longa vojaĝo estus la tri aliĝpetoj de la landaj asocioj al UEA, oni devus kontenti kaj kun ĝojo noti, ke okazas io esenca rilate la tutmondiĝon de la Esperanto-movado.

### **SUKCESA KONGRESO EN MARÍLIA**

En tiu kunteksto reaperis la malnova ideo organizi regionajn kongresojn, ĉi-kaze kiel antaŭe, pro la ĉefa deziro koni kiel tiam funkciadis la Movado en la diversaj landoj en Latinameriko.

Rezulte de ĉio-ĉi, inter la 17-a kaj la 22-a de julio 1978, en Marília – 460 km nordokcidente de San-Paŭlo – okazis la Unua Latinamerika Kongreso de Esperanto, kiu sukcese kunvenigis kvincenton da kongresanoj el 12 landoj de Latina Ameriko.

Krom aŭspicio de UEA, la Kongreso ankaŭ ricevis fortan apogon de la Registaro,

ĉar la Ministerio pri Edukado kaj Kulturo decidis subvencii ĝin, dum la urbodomo disponigis senpage 300 dormlokojn por la partoprenantoj kaj eldonis turisman broŝuron en Esperanto pri la urbo. Okaze de tiu Unua Latinamerika Kongreso, la brazila poŝto lanĉis porokazan stampon.

Do, malnovaj revoj fine trovis vojon fariĝi realo, kaj tio montris la verajn kapablojn kaj dezirojn de la esperantistoj de parto de nia kontinento kreskigi kaj plifirmigi la movadon en la regiono. De tiam, oni povas paroli pri nova etapo de (kaj por) Esperanto en Ameriko. Poste venus la 2-a Kongreso, la 66-a UK en Braziljo, ... kaj aliaj gravaj okazintaĵoj, kiuj certigis la ekziston kaj aktivan vivon de grupoj, kluboj, asocioj, unuiĝoj, federacioj, ... en tiu ĉi parto de la mondo.

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

*Multon oni devis atendi, ĝis finfine realiĝis  
la propono lanĉita en marto, 1916:  
Latinamerika Esperantista Unuiĝo,  
Latinamerikaj Kongresoj, kunigo de la  
fortoj de tuta kontinento: intertempe oni  
eĉ okazigis Universalajn Kongresojn...  
sed jam oni pretigas kondiĉojn por la  
6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto!*



## Kia Esperanto-movado por Ameriko?

Tiu ĉi demando tute ne estas retorika: ĝi elektigis kiel ĉeftemo de la venonta 6-a TAKE pro tio, ke laŭ opinio de multaj esperantistoj, la situacio de Eo en Ameriko postulas novan alrigardon.

Sed la problemoj de Eo simple respegulas la problemojn de nia kontinento: Eo ne estas aparta ero, memstara kaj fora, kiu per simpla mencio de siaj avantaĝoj kiel komunikilo magie altiras la atenton de ĉiuj. La ekonomika situacio de la plimulto el niaj landoj, plus la ĉiea altrudo de la angla, ne faciligas ke la homoj elektu Eon kiel duan, lernendan lingvon. Por multaj homoj, lingvo per kiu oni ne nepre kaj aŭtomate havigos al si pli altan salajron aŭ pli prestiĝan laborpostenon, restas kiel hobbio aŭ afero esplorenda "kiam mi havos tempon liberan por tiaj aferoj"... Por multaj el niaj kubaj gejunuloj, ekzemple, Eo aspektas interesa "eksperimento", sed iomete malrealisma (Ĉu vere vi kredas, ke iam estonte ĉiuj parolos Eon?) Kaj nur malmultegaj vere konscias pri la lingva problemo. Ne pri la graveco de la problemo, sed pri ĝia nura ekzisto. Ĉiuj ŝajnas akcepti kiel normalan, situacion je mis- aŭ eĉ manko da interkompreno en rilatoj inter homoj el diversaj etnaj aŭ naciaj fonoj.

Do, afero por "grizuloj" aŭ almenaŭ kvardekjaruloj...

Agrabla escepto estas la brazila movado, svarma je junuloj. Sed la normo ŝajnas esti, ke Eon oni nur lernas, kiam oni akiras laboran stabilecon kaj maturiĝon. Oni do profitas sperton kaj seriozecon, sed foje mankas energioj kaj la kontaĝa entuziasmo de la plej junaj.

Tio kondukas al la fakto, ke en multaj landoj de nia kontinento ne estas landa asocio, kaj kelkfoje eĉ ne individuaj, "oficialaj" esperantistoj aperas. La asocioj havas mezume centon da asocioj. Povas esti, ke oni altiras la atenton de ĵurnaloj aŭ radiostacioj per vere interesaj, elpensitaj demandoj kaj intervjuoj, kaj poste mankas laborforto por plua puŝado de la ĵus malfermitaj pordoj.

Plia problemo, kaj por mi pli grava, estas la nesufiĉa kunlaboro inter niaj asocioj. Ofte tio ŝuldiĝas simple al manko da rimedoj, ĉefe monaj, kvankam volo ja ekzistas. Foje nesufiĉa informado ne permesas, ke la pli fortaj asocioj helpu la burĝonajn. Interŝanĝo de aktivuloj kaj dokumentoj, komuna partopreno aŭ okazigo de eventoj (bela ekzemplo estis la kolombia-venezuela kongreso), Interkonsentoj pri tio jam ekzistas, sed ankoraŭ ne videblas tro da rezultoj.

Do, al la demando: kia E-movado por Ameriko? Mi respondus: solidara!

ALBERTO GARCÍA FUMERO





Internacia Librofoiro 2003

## KEA ĉi-jare en kvar provincoj


Kiel jam tradicie, la kubaj esperantistoj tute ne preteratentis la plej gravan eventon rilate al libroj kaj eldonado okazanta nialande ĉiun jaron: la Internacia Librofoiro. En 2003, KEA plezure respondecis pri la ĉeesto de la informbudo pri la Internacia Lingvo kaj

ĝia movado inter la partoprenintoj en kvar provincoj: Urbo Havano, Ciego de Ávila, Santiago de Kubo kaj Holguín.

La Esperanto-budo en Havano ĉi-jare (de la 30a de januaro ĝis la 9a de februaro) estis iom pli modesta, sed bone proviziita



*Ĉiutage, de la 10-a matene ĝis la 10-a vespere, estraranaj kaj aktivuloj de KEA laboris en nia stando. Ĉi-kaze, d-rino Carmen Aleida Hernández Socarrás – komisiito pri Kuba Esperanto Medicinista Agado (KEMA) – kaj Juan Ramón Rodríguez Gómez – ĝenerala sekretario de KEA – kiu plentempe deĵoris en la Librofoiro. (Foto: Marta Alonso Gutiérrez.)*



kiel antaŭe per dekoj da allogaj libroj kaj gazetoj – krom nova informfolio pri E-o, kiun ni disdonis en kelkmila kvanto –, kie la tutan tempon vizitantoj havis ŝancon informiĝi pri la IL kaj ĝia nuntempa situacio tra la lando kaj en la mondo.

Niaj vizitantoj ne nur estis havananoj, sed homoj el la tuta insulo kaj eksterlandanoj kaj, kompreneble, dekoj da librokomercoj, verkistoj, eldonistoj, ĵurnalistoj kaj turistoj el dudeko da landoj, kiuj same demandis, komentis kaj informiĝis pri la lingvo de Zamenhof. Pli ol cento el la kubanoj lasis ĉe ni sian adreson celante ricevi poste pliajn informojn; kelkaj el ili nuntempe estas en nia kursoj.

La KEA-estranaro kaj aktivuloj deĵorintaj en nia stando kompreneble profitis la ŝancon paroli publike la Internacian Lingvon, kio ankaŭ ege valoras, ĉar denove la skeptikemulojn oni devis konvinki per plej senperaj pruvoj, ke Esperanto funkcias tute normale kaj ke ĝi vivas tre sane, preter la lemolibroj kaj literaturaĵoj de ni montritaj sur la bretoj.

Post la fermo de la Librofoiro en Havano, KEA unuafoje spertis partoprenon je ĝia etendigo tra la lando: inter la 17a kaj la 23a de februaro, en Ciego de Ávila; kaj de la 24a de tiu monato ĝis la 2a de marto, en Santiago de Kubo (ankaŭ per stando) kaj Holguín, urboj kie centoj da personoj interesiĝis pri la lingvo kaj la rezultoj ankaŭ estis sufiĉe fruktodonaj.

Resume, nia partopreno en la Librofoiro 2003 permesis, unuavice, multe pli diskonigi kaj propagandi Esperanton tra la lando, sed samtempe havi diverstipajn kontaktojn kaj interŝanĝojn kun intelektuloj, kaj plifortigi rilatojn kun kulturklerigaj institucioj, kio sendube montras ke tiu vojo ankaŭ validas por Esperanto kaj iom post iom malfermos novajn pordojn al nia agado.

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

# La Esperanta kanzonistiko en Kubo

Inter la ĉefaj trajtoj de la kuba E-movado sur la kultura kampo elstaris, preskaŭ de la fondiĝo mem de KEA, la kanzono, kiel vehiklo por esprimado de ideoj kaj sentoj intime ligitaj al la junularo, kiu estis kaj ankoraŭ nun estas esence konsista parto de la enlanda esperantistaro.

Ĝuste tial, profitante la okazon, kiun donas al ni ĉi tiu kultura festivalo,<sup>1</sup> kies sidejo, Santiago de Cuba, estas la vera lulilo de la kuba popola kanzono, ni esploras la evoluon de ĉi tiu artobranĉo en Esperanto nianlande.

El la unuaj jaroj de KEA menciindas du nomoj, kiuj multe kontribuis al tiu agado, kvankam nun ili ne apartenas al niaj vicoj. René Valdés, (elmigrinta en 1980) la unua vicprezidanto de la asocio, vere brila esperantisto, tradukisto, komponisto kaj kantanto, regalis nin per la unuaj originalaj kanzonoj kaj tradukoj el la hispana, kiuj fariĝis trezoroj de nia kultura historio. Tamen, ankoraŭ nun, en la memoro de kelkaj fondintoj restas liaj poetikaj originalaĵoj, kiuj eĉ estis elsenditaj en 1979 dum la unua programo pri Esperanto, elsendita de Radio Havano Kubo. Nepras citi pecon el infankanto, kiun li verkis, pro la beleco kaj tenero de la enhavo. Do, aŭskultu:

*Dormu, bebo mia, dormu en ripoz',  
dum en la ĝardeno kreskos nova roz',  
dum la luno brilos alte en ĉiel'  
kaj la vento blovos kun signifa cel'.*

La alia nomo de tiu frua periodo de KEA, kiun oni ne povas ne mencii, estas Alfredo

Caballero, kiu pro sankialoj apartiĝis de la movado, kvankam liaj tre sporadaj partoprenoj en aranĝoj permesas al ni konstati, ke lia regado de la lingvo estas sufiĉe bona por ne nur flue paroli ĝin, sed ankaŭ por kanti. El liaj tekstoj, permesu al mi citi parton el kanzono sufiĉe alloga, kies titolo estas "Pro tio ĉio". Jen ĝi:

*Ĉar vi alvenis, dum mi suferis,  
ĉar mian galon vi faris dolĉa,  
ĉar vi mildigis malĝojon mian,  
nun mian fidon al vi mi donas.*

Estas mirinde, ke jam en tiu frua epoko de nia asocio estis homoj tiom kapablaj pere de gitaro, voĉo kaj talento tiel utili al la kultura pliriĝigo de nia movado.

Ĉar ni menciis la gitaron, estas necese klarigi, ke ĝi rolis en ĉiuj kazoj, ne nur en tiuj de la jam menciitaj nomoj, sed en ĉiuj aliaj, kiujn ni poste mencias, gravedan rolon, ĉar ĉiuj niaj kanzonistoj estas samtempe trobadoroj kaj uzas la gitaron kiel fidefan kunulon. Per ĝi ili ne nur akompanas sin, sed rekreas la universon de la muziko daŭrigante la tradicion de la plej eminentaj trobadoroj de la kuba muzika historio.

Komence de la okdekaj jaroj elstaris figuro, kies kanzonoj iel fariĝis – kaj ankoraŭ nun estas – simboloj de nia kulturo. Temas pri Julián Hernández, nuna prezidanto de la asocio kaj motoro de nia kanzona kulturo.

Sub la nedubebbla influo de John Lennon, la poeto de la 60-aj kaj 70-aj jaroj, Silvio Rodríguez kaj Pablo Milanés, kunfondinto

de la Movado de la Nova Kanzoneo, kies verkoj tekste kaj melodie daŭrigas sub nova vesto adaptita al novaj sociaj kondiĉoj la tradiciojn hereditajn de la popola kanzoneo, Julián komencis eĉ ekspluati la tentojn de nia lingvo per tekstoj proponantaj novajn ideojn. Ritme facilaj kaj allogaj, la melodioj estas metataj en la servon de idealoj, kies esenco estas absolute kongrua kun la idealoj de la esperantismo.

Ekzemplo tre taŭga pri tio estas la jena strofo el "Kun verda stelo en la manoj", kanzoneo, kies titolo estas per si mem sufiĉe elokventa:

*Mi trovis amikojn,  
mi trovis gefratojn,  
mi trovis tiom da manoj,  
mi trovis samideanojn,  
amikojn,  
kiuj marŝas tra la sama vojo,  
kun verda stelo en la manoj.  
Gefratojn batalantaj por la sama celo  
malfermis pordon al la homaro.*

En aliaj tekstoj – tiuj, kiuj temas pri amo – lia lirikismo flugas pli alte kaj donacas al ni beletajn perlojn, kiuj kirliĝas en la memoro. Jen peco el "Peto", kiu laŭ mi estas unu el liaj plej solidaj kanzoneoj el ĉiuj vidpunktoj:

*Mi petas la precizan ĝustan vorton,  
tiun frazon, kiu ĉiam difinas min,  
mi petas la konsilojn de viaj lipoj,  
mi petas viajn zorgojn kaj ne pli.*

Ĉefaj temoj en la kanzoneoj de Julián estas amo kaj Esperanto kiel idealo, kvankam eblas ankaŭ diri, ke laspeca interna vivo-ĝojo vibras en liaj tekstoj. Liaj melodioj, kiuj altrudiĝas en la orelojn penetrante la kordon, estas facilaj, kaj en kelkaj okazoj ne mankas al ili vera inspiro kaj refreŝiga aero.

Laŭ mia juĝo, Julián estas pli bona muzikisto ol poeto, malgraŭ la fakto, ke en kelkaj tekstoj liaj troviĝas elegantaj versoj. Bedaŭrinde, en ili ne abundas vere belaj metaforoj, sed lia klara kaj profunda voĉo impete vibras, pro la sentemo, kiun li elverŝas dum kantado.

Tute alia estas la kazo de Argelio Guadarrama, kiun oni nepre devas konsideri unue kiel poeto kaj poste kiel komponisto kaj kantanto.

Multe pli pretendemaj el teksta vidpunkto, la kanzoneoj de ĉi tiu trobadoro estas vangofrapoj al la vipantoj de la homaro.

Argelio kreas kanzoneojn, kies mesaĝoj instigas pensi, ke eblas plibonigi la homan socion. Li denuncas ĉion, kio maku-las la homon, kaj liaj tekstoj estas vipoj, sed vipoj, kiujn li maskas sub vere brilaj metaforoj kaj poeziaj artifiko. El lia plej konata kanzono, "Flugos kolomboj", jen strofo:

*Nur la amo povas rabi lumon  
de la tago por la nokto kaj  
semi florojn en la maro, tiam  
la amo brilos pli ol oro.*

Vere kortuŝa estas "Ŝildo kaj lanco", en kiu li konstatas la teruran minacon, kiu pendas super la mondo, tamen fieras pri sia konvinko pri la venko de novaj idealoj. Liaj metaforoj ĉizigiĝas en la spirito, ĉar ne facilas forgesi pecon kiel jenan:

*Kiu havas ŝildon, poste volas lancon,  
ni estas el vitro kaj ludas per ŝtono.  
Pluvas, tamen nia stelo brilos iam  
verda ĉe la brusto de la mondo.*

Kaj kiom elokvente humanisma plendo – kaj samtempe pledo – estas ĉi tiu peco el "Trans mia fenestro", lia plej elstara kontribuo al la kuba E-kanzoneo:

*Kiom da piedoj sur la strato,  
kiom da buŝoj jam ne ridas,  
kiom da ombroj jam ne helpas,  
kiom da steloj jam ne brilas.  
Kiom da larmoj sur la okuloj,  
kiom da sango ĉe la brusto,  
kiom da monumentoj mankas,  
kaj kadavroj, kion mi faras?*

Ĉi tiu demando, *kion mi faras?* estas la korkrio de homo sentema kaj angorskuata de la sorto, kiun devos affronti ne nur li, sed ankaŭ liaj kunhomoj.

Oni povus perfekte diri, ke Argelio estas spirito, kiu utiligas la arton kiel armlon por batali cele al la plibonigo de la homaro. Nek lia voĉo nek lia melodio estas tiom allogaj kiel tiuj de Julián, sed liaj tekstoj estas juveloj de profundo kaj homamo, plurfoje tiom poetikaj, ke oni sentas, ke li estas poeto en muzika vesto.

En "Ne kompreneblas" aperas strofo inda je ĉiama memoro pro la mesaĝo, kiun ĝi enhavas. Mi ne rezistas la tenton citi ĝin:

*Mi ne komprenas la nepran morton,  
soifanta fero, senfina nokto,  
mi ne komprenas la homan rajton,  
altega tablo, mallonga mano.*

Estas tre bedaŭrinde, ke ili ambaŭ ne pli ofte aperas sur la internacia Esperanto-scenejo, ĉar tutcerte al ambaŭ ne mankas talento kaj kvalito. Mi certas, ke kasedoj kun iliaj plej bonaj kanzonoj forvendiĝus (tio certe jam okazis en ambaŭ kazoj dum Universaliaj Kongresoj) ne nur eksterlande, sed ankaŭ inter nia anaro avida je bona Esperanto-muziko.

Tamen, ne nur Julián kaj Argelio kontribuis al la evoluo de la Esperanta kanzono en Kubo. Kiel aŭtoroj de originalaĵoj estas menciendaj la nomoj de Martín Castro kaj Héctor Jiménez. Ĉi tiu lasta – almenaŭ laŭ

mia takso – estas la plej bela voĉo en nia asocio. Pri Héctor estas substrekinda la fakto, ke li dediĉis sin al la tradukado de la muzika ĝenro, kiun oni konas sub la nomo *bolero*. Lia ĉeesto en aranĝoj de KEA garantias bonguston kaj kvaliton en la muzika interpretado de la kuba popola kanzono.

Same sur la kampo de tradukado eblas menci la nomojn de Maritza Gutiérrez, Pedro Fernández, Orlando Raola kaj Gustavo Morales (la du lastaj ankaŭ elmigrintaj) kaj tiu, kiu nun parolas al vi, kune kun aliaj, kiu sporade kontribuis al tiu agado.


Necesas substreki la fakton, ke pro la karaktero de la kuba popolo la kanzono ĉiam ludis, ludas kaj ludos tre gravan rolon en la kultura vivo kaj interesoj de kuboanoj.

Kompreneble, la esperantistoj en nia lando ne estas fremdaj al tiu influo kaj, kvankam juna kaj ankoraŭ ne plene matura, jam eblas paroli pri vivanta kuba Esperanto-kanzono.

Flegi kaj evoluigi ĝin estas nia devo – ne nur de la aŭtoroj, sed ankaŭ kaj speciale grave de la konsumantoj – ĉar muziko estas tre nobla arto, arto, kiun ĉiu homo ŝatas kaj pere de ĝi ni povas plifirmigi la kulturen identecon de movado, kiu jam konkeris lokon en la historio de nia lingvo kaj kiu senĉese laboras por la bono de Esperanto, kiu estas ankaŭ la bono de ni ĉiuj.

Ĉi tiu prelego estas skizo de laboro plenumenda de pli kapablaj homoj, kiuj povus ĝisfunde esplori la latentajn de nia kanzono. Mi esperas, ke ĉi tiu mia klopodo iel plilumigis faceton de nia movado plena je belaĵoj kaj kore dankas urbon Santiago de Cuba, vartejo de la kuba popola kanzono pro la ebleco, kiun ĝi donis al mi, pere de tiu jam sukcesplena festivalo, tuŝi temon tiom proksime kara al la koro ne nur de santiagoanoj, sed de ĉiuj kuboanoj.

JUAN LAZARO BESADA



*Mia vojo*, Leda Violeta Coronado. Tr. Guido Hernández. Kostariko 2002.

Ĉarma, vere ĉarma infanlibreto, estas *Mia vojo*, verkita de Leda Violeta Coronado kaj vigle esperantigita de Guido Hernández. La libro, kolorigebla, estas trilingva (hispana, angla, esperanta) kaj reprezentas la unuan aperon de Eo sur la libromarkato en Kostariko.

La verko ne estas simpla infanlibro enhavanta naivajn, kvankam amindajn bildetojn, sed eduka, ekologia instruo pri la vojaĝo de akvoguto.

Tio aldonas plian valoron al la verketo. Ne oftas en nia medio, kiom mi scias, tiaj verkoj; la aŭtorino lerte konsciigas la infanojn pri la grava rolo de akvo en la naturo kaj la bezono protekti akvofontojn por ke la vivo pluekzistu sur la Tero. La mesaĝo estas prezentita per trafa lingvaĵo, kiun la esperanta versio respegulas.

Unusola rimarko ricevis la libro en recenzo antaŭa, kaj ĝin mi opinias tute negrava: la origina hispanlingva titolo estas: "Mi viaĝe", kaj la esperanta versio ĝin ŝanĝis al "Mia vojo". Tio ja oftas, ke la titolo de versio de libro ne similas al la originala titolo. Post konversacio kun la tradukinto, mi komprenis, ke li simple deziris substreki la ciklan, longan kaj penan vojon trairendan de akvo en naturo. "Vojaĝo" ne tiom facile rilatiĝas al ripetado, ĉu ne?

La kolora koverto de la verketo estas tre alloga kaj ne nur infanoj hastas trafoliumi ĝin. Ni gratulas la kostarikajn fratojn pro tiu grava atingo, kaj kompreneble atendas sek-vajn eldonaĵojn.

Resume, agrabla donaco por denaskulo!

TINEO

*Helpu kompletigi la historian arkivon  
de nia Asocio per fotoj de E-aranĝoj.  
Ni atendas viajn kontribuojn!*

## Inaj vortoj

—Nu, PIVulo, kiom da inaj vortoj enestas en la vortaro?

—Kion vi celas per tio? Ĉu "inaj" vortoj? Virino, mi supozas, kaj "ino", kaj ĉio, kio finiĝas per ino, krom benzino...

—Ne ŝercu! Mi trovis tutan amason da vortoj, kiuj enhavas la radikon **-in-**, kaj en vero mi ne scias, kiel oni povus esti certa pri la signifo. Laŭ mi tiuj vortoj estas erarigaj...

—Ĉu? Esperanto ne estas robota lingvo, do eblas, ke kelkaj vortkombinoj estu komplikaj, aŭ eĉ glitigaj... pri kiuj vortoj temas?

—Vi vidus... oni ĉiam diras, ke vortoj en Esperanto kreiĝas per kunmeto, kaj mi ja akceptas kunmetojn kiel, ekzemple, tajpilo, tablotuko, manĝoĉambro...

—Vi ĉiam mencias manĝoĉambron... ĉu vi jam malsatas?

—Tute nel Temas pri ekzemplo. Sed, bone, se eblas mordeti ion... Vi scias, ni junuloj ĉiam bezonas rekapti la energiojn perditajn...

—Iru demandi la kelneron. Sed vi parolis pri "inaj" vortoj, kaj estas ankoraŭ montrinta neniu al mi.

—Jen ili! Konsideru la jenan: "investi"...

—**"investi"** rilatas al mono. Oni investas, se oni dediĉas monon por starigo aŭ pliampleksigo de negoco, ekzemple. Kiel tio rilatas al "inoj"? Ĉu vi celas diri, ke oni devas investi en inoj anstataŭ ol en negocoj? Vi iros en karceron...

—Pa, PIVulo! Vi bone komprenis min! Kial **"investi"** ne analizeblas kiel **"in-vesti"**, tio estas, **vesti iun kiel inon**? Laŭ mi tio ja havas sencon. Same **"insidi"** analizeblas kiel **"in-sidi"**, **sidi kiel ino**. Ĉu eblas, ke Esperanto estu tiel **ĥaosa kiel la etnaj, naciaj lingvoj**? Kial ne ekestas miskomprenoj?

—El kie vi tiris tian rezonadon? Eble komputila tradukprogramo, malbone uzata, povus prezenti al vi tiajn sensecaĵojn. Sed la unua, kion parolanto de la internacia devas havi enmense, estas komprenebleco, kaj due, **senambigueco**. **"Ine vesti"**, aŭ **"vesti ine"** estus la ĝusta maniero esprimi, kion vi celas. Aliflanke, ekzistas la radiko **invest-** kun la senco, kiun mi jam diris. Kiam ekzistas la ebleco je miskompreno, oni ĉiam enmetas kroman vokalon, tiukaze "e", do **"in-e"**, por havi la sencon pli klara.

Ekzemple, **"aro da radoj"** estus **"radaro"**, vortkombino perfekte uzebla kaj esperanta, sed ĉar jam ekzistas la vorto **"radaro"**, kun la senco **"aparato kiu per elektromagnetaj ondoj kapablas detekti aviadilojn, ŝipojn, ktp"** oni uzas la formon **"rado-aro"**, per enmeto de la vokalo "o", do la senco restas klara.

Same oni devus diri **"ine sidi"**, kun adverbsa vokalo "e", se oni celas diri **"sidi kiel ino, aŭ virino"**, ekzemple kun genuoj tipe kunigitaj aŭ io simila, mi supozas. Ĉu vi imagas, kiom da **"inaj"** vortoj ekzistus, se via teorio estus ĝusta? La vorto **"invento"** havus la signifon **"ina vento"** aŭ **vento de ino**, (mi preferas ne pensi, pri kio temus tiukaze)...

—Feliĉe, ke vi klarigis tion! Nun mi ne eraros tiel, sed... ĉu vi rememoras tiun instruiston, kiun ni devis forpeli pro tio, ke li persekutis ĉiujn knabinojn, kiel eble plej junajn?

—Jes, sed kial...?


Vi eĉ ne divenetas, kiom mi ridis, kiam mi sciis, ke iam oni proponis lin estraranon pri **"in-formado"**!

PIVULO



21a -27a de marto 2004  
Havano, Kubo

**Kia Esperanto-movado  
por Ameriko?**



# QUANCO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

Kuba Esperanto-Asocio

Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo

Telefonoj: +53(7)40 4484; 53 9102 Fakso: 649 8729

kubesp@enet.cu

Ciferecigis: Javier Ramos  
@Radioamatoro